



NORDHUNGARIA INFORMO

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc**

Augusto 2008

3-a jarkolekto n-ro 36.

Tartalom

AŬGUSTO	3
VIVOVOJO De D-ro Ludoviko Gyóry Nagy	4
NI FUNEBRAS	7
Dek kvin principoj de la moderna hejmo	8
INFORMOJ	9
GYÖNGYÖS	10
HUNGARA FERVOJISTA MONDO, 2002 – 2006.	11
Distingoj	12
Diversaĵoj	12
Castro kaj Kristo	18
2008: estas ankaŭ, jaro de la akvo	20
La ĉijara Internacia Amika Renkontiĝo de la Esperantistaj Fervojistoj, inter 27-29 de Junio 2008	21
INFORMO	22
Denove pri la Zamenhof –Trajno	23
Ekzistas luktoj spiritaj	23
„IRIS” ESPERANTO-FESTIVALO-Szolnok	23
Ĉu vi scias, ke la geometria mezo de Eŭropo estas ĝuste en Hungario?	25
Historio de la miŝkolca esperanto-movado	25
UNU EPOKO FINIĜIS - MORTO DE D-RO KOLOMANO KALOCSAY	25
Memoriga landa renkontiĝo en Miskolc	26
ŜERCO	28
DISTINGOJ	29

AŬGUSTO

Stefano kaj la tri Ludovikoj



Miŝkolca skulptaĵo de nia reĝo Stefano la 1-a.

Karaj legantoj!

Al la eventoj aranĝataj ĉi-monate, krom la tradiciogardantoj kaj historifidelaj arkpafistoj ni atendas tiujn-ĉiujn, kiujn interesas la hungara historio, ke ni povu tutmerite festi la grandan feston de nia popolo; *la 19-an de Aŭgusto: naskiĝdaton de nia ŝtatfondinto reĝo Stefano la 1-a*, kaj *la 20-an de Aŭgusto, la feston de nia konstitucio kaj Tagon de la Nova Pano*.

Laŭ decido de la Hungara Parlamento la 5-an de Marto en 1991: ekde 1991 la 20-a de aŭgusto estos oficiala ŝtata festo de la Hungara Respubliko.

El la supre menciitaj vi parte jam divenis kial mi donis tiun titolon al mia enkonduka dirindaĵo. Sed, kiu estas tiuj tri Ludovikoj? Mi rakontos tuj.

La 25-an de Aŭgusto, ĉi-tie, en Hungario oni gratulas kaj festas la virojn havantaj nomon Ludoviko tiutage la familianoj, geamikoj kunvenas kaj plej ofte en senĝena etoso gratulas la festiton. Sed se forpasinto havas nomon Ludoviko, ni portas floron al ties tombo, aŭ florkronas la memortabulon de nia altestimata, kara persono. El inter la tri Ludovikoj la unua estas: **d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof**, kreinto de la lingvo Esperanto, la aliaj estas: **Ludoviko Király**, kaj **d-ro Ludoviko Győry Nagy**.

En 1913, d-ro Ludoviko Győry Nagy kun sia amiko d-ro Kolomano Kalocsay, per organizo de la unua Esperanto-lingvokurso ekirigis en Miŝkolco la disvastigon de la internacia lingvo. Sed, kiam d-ro Ludoviko Győry Nagy forlasis Miŝkolcon en 1920 pro politika kaŭzo, lian rolon transprenis Ludoviko Király. De 1920 ĝis sia morto (1960) Ludoviko Király gvidis kaj organizis la Esperanto movadon en Miŝkolco. Li estis mezlerneja matematik-instruisto, konsekvence konstruis tiun vojon, per kiu li antaŭhelpis en Miŝkolco la rekonon de lingvo de Zamenhof; la lingvo Esperanto.

Lian memoron gardas ankaŭ la nomo de nia Esperanto-Amika Rondo, estiĝanta en 2005.

Ilia vivovojo montras, ke Ludoviko Király (Kiraj) kaj d-ro Ludoviko Győry Nagy (Lajoŝ Djori Nadj) agante unu post la alia, - dumvive – penadis por disvastigi la lingvon Esperanto.

Kio estas komunaj en personecoj de la festataj kvar?

Tio estas ilia kredo. Ili kredis je Dio, kaj en tiu, ke pere de vortoj de Dio la homo povas krei amon, interkomprenon, pacon ĉirkaŭ si, kiuj estas la kondiĉoj de la evoluo, de la daŭra renoviĝo kaj konstruo de la pli ĝoja estonto; inter la problemoj de la tera ekzisto.

Nun mi rakontos pri d-ro Ludoviko Győry Nagy. Kial?
Bonvolu privilegi lian vivovoĵon kaj vi ricevos respondon al tiu demando.

VIVOVOJO De D-ro Ludoviko Győry Nagy

Lajoŝ Győry Nagy, naskiĝis la 12-an de Marto 1892, en Gömörmihályfalva. Lia patro estis fervoja oficiro. La bazlernejaj studoj estis finitaj en kelkaj lokoj de Supera Hungario, depende, ke la fervojo kien translokis por labori lian patron. Li komencis la gimnaziajn astudojn sur tereno de la nuna Slovakio, sed post la translokigo de patro en Miŝkolco, li daŭrigis ĝin en la Kalvinana Gimnazio „Lévay, József”. En la gimnazio li konatiĝis kun la sambenka samklasano; la pli posta d-ro Kálmán Kalocsay (Tiu iĝis kuracistprofesoro, universitata profesoro, poeto, verkisto, lingvisto, arta-tradukisto), kun kiu li estigis amikecon ĝis vivofino. Tiu Kolomano Kalocsay, iĝis „Kazinczy” (kiel li, lingvoreformanto) de la lingvo Esperanto. Ludoviko Győry Nagy abiturientiĝis en 1909. Li finis siajn universitatajn studojn en Budapeŝto. Dum akiro de sia diplomo pri estiĝi advokato, li finis ankaŭ la Muzikartan Konservatorion laŭ la violonfako, tamen li iĝis advokato. Poste li finis ankaŭ ekzamenon al diplomakiro de advokat-juĝisto.

Dum la 1912-a somera instrupaŭzo li ekvidis esperanto-lingvolibron en iu montrofenestro de librovendejo, kaj je aŭtuno kune kun Kolomano Kalocsay, li jam ellernis la lingvon. En 1913, kune kun Kolomano Kalocsay li organizis la unuan miŝkolcan esperanto lingvokurson. Al du grupoj dividante la 50 anoncantojn, ili instruis tiun-ĉi lingvon. (La kurson inaŭguris la papa prelato d-ro Aleksandro Gisswein, en solenejo de la Urbodomo de Miŝkolco, per apogo de urbestro Hodobai) La loko de la kurso estis en Miŝkolco la Deák-strata Komerca lernejo. Pli poste li verkis rememoron pri tiu „Kiel komenciĝis” titolan.

Bedaŭrinde tiu-ĉi rememora verketo, kune kun la ceteraj esperanto-dokumentoj — garditaj ĉe la Kulkurdomo „Rónai Sándor” — malaperis post lia morto, sed ties ekziston pruvas verketo de Stefano Pál: „Elektaĵoj el historio de la esperanto-movado de Miŝkolco.”

Je fino de la unua mondmilito oni invitis militservi D-ron Ludoviko Győry Nagy. En 1918, pro vundiĝo sur la itala milit-tereno, oni malmarmis lin.

Dum la Konsilentara Respubliko en 1919, li iĝis notario, poste la akuzkomisaro de la revolucia tribunalo, ĉar li estis konvinkita, ke la Habsburg-reĝimo estis la kontraŭanto kaj malhelpanto de la politika kaj ekonomia evoluo de la tiama Hungario. Post falo de la Konsilentar-respubliko, oni ekzilis lin pro lia agado en vilaĝon Mezőcsát (mezoĉĉaat), en 1920. De tie li havis rajton reveni en Miŝkolcon, nur en 1925.

Ankaŭ en historion de la Avaŝ-monta sonorilturo li enskribis sian nomon. D-ro Ludoviko Győry Nagy

La sekvan skribis pri tio, Novotny, Gyula: en sia preĝejhistoria verko: Az Avasi Templom Története (Julio Novotni: Historio de la Preĝejo de Avaŝ):

„Pli frue la sonorilturo havis horloĝon, sed ĝi malboniĝis ofte. En la turo oni gardis ĝian mekanismon artobjektan... Post plurjardeka muteco, la turhorloĝo denove montris la tempon la 19-an de majo en 1941, per alia mekanismo kaj tekniko... Tiu denove montras la horojn, kaj kronometras la paseman tempon... Al la horo apartenas kvaronhorojn batanta kariljono, kiun oni agordis sur la batojn de Westminster kaj Wiittington, kaj pro ĝiaj tri diversaj melodioj ĝi estas unika en la lando.

La donacletero de la en Miŝkolco loĝantoj kaj eklezianoj; D-roj Ludoviko kaj Stefano Gyóry Nagy (ambaŭ esperantistoj) estas skribita:

„La bonecon de la dia providenco, ke ni povis ĝisvivi la 50-an geedziĝan datrevenon de niaj gepatroj, por danki ni ne havas sufiĉe da forto, kaj se ni pensas pri videbla esprimdono pri nia dank sento pro la Ĉiopova, al nia eklezio tiu-ĉi estas nur modesta elmontriĝo de la dankemo plenigata nian animon.”

La memoron de la havigo, gardas la teksto de la blanka marmortabulo, metinta sur la orientan muron de la turo:

„La 19-an de Majo en 1941, Ludoviko kaj Stefano la fidelaj filoj starigis la Avaŝ-montan kariljonan turhorloĝon je gloro de Dio kaj je memoro de 50. geedziĝ-datreveno de siaj gepatroj Ŝamu Gyóry Nagy kaj Irma Mihályfalusi Forgon.”

Tiu-ĉi kariljonludo aŭdeblas en nia urbo kvarloke:

- 1, la Miŝkolca Studio de la Hungara Radio, per tiu muziko anonciĝas kaj komencas sian Programon.
- 2, Tie, sur la Sonorilturo de monto Avaŝ, apud la kalvinana preĝejo,
- 3, Kiel paŭzsigno en la teatro Déryné, kaj
- 4, Kiel muziko de la stratangula horloĝo ĉe kruciĝo de stratoj Széchenyi kaj Kazinczy. (Veras, tamen la fakto, ke pli frue la eklezio, pli poste mem la urbo renovigis la dume malboniĝintan turhorloĝon.)

D-ro Ludoviko Gyóry Nagy edziĝis la 15-an de Aŭgusto en 1946. Lia sola filino naskiĝis la 16-an de Aprilo en 1950. Lia filino Helena Gyóry Nagy, sekvas sian patron sur la muzikista kariero. En Miŝkolco ŝi laboras ĉe la „Erkel, Ferenc – Egressy, Béni” Bazgrada Arbista Instrua Instituto. Ŝi estas ĉelo-piano fak-muzikinstruistino. 35 jarojn ŝi agadis – ĉe la Miŝkolca Simfonia Orkestro – kiel ĉelo-muzikartisto. Ŝia edzo nomiĝas Kis, Ferenc József. Ŝia loĝadreso estas: 3530. Miskolc, str. Petőfi, nro.11.

Dum la 1953-a jaro, en Miskolc, L.Gyóry Nagy kreis la Advokat-Komunumon n-ro 2, kies unua gvidanto li estis ĝis la pensiuliĝo en 1967.

D-ro Ludoviko Gyóry Nagy post la reveno en Miŝkolcon, estigis malgrandan orkestron, kaj en sia doma-orkestro li muzikis kun multaj miŝkolcaj fakuloj pri muziko, tute ĝis sia morto. Li muzikis ekzemple kun Francisko Gombás; muzikĉeflerneja ĉelo-faka profesoro, kaj kun Adalberto Lökös: mezlerneja instruisto de la hungara lingvo (edzo de la teatra dirigentino Eva Herédi).

Sed, en sia libertempo li ne nur muzikis, sed gvidis multajn esperanto-lingvokursojn (ankaŭ por pedagogoj), ekzamenis, kaj partoprenis plurajn esperanto-mondkongresojn kiel individua membro kaj delegito de UEA en Miŝkolco, por Hungario. Li estis membro de Komitato de HEA. Ie ajn li iris, ĉie, al ĉiuj li parolis pri la uzebleco, avantaĝoj, kulturaj valoroj de tiu-ĉi lingvo.

Li estis tre bonvolema homo. Li ŝatintus, se ankaŭ aliuloj vidus – simile al li – la eblecon de transdono de la universala kulturo. Li ŝatis pludoni siajn konojn al aliuloj, kaj li helpis ĉiam, ĉie, tiam, tie, kie tio necesis: foje per jura, sed foje nur per simpla-, lian vivkonon pruvanta - konsilo. Post la morto (1960) de Ludoviko Király, kiu prezidis la Eo-fakrondon de la Departementa Sindikat-domo de Miŝkolco, d-ro Ludoviko Gyóry Nagy estis elektita ne nur E-kluba prezidanto, sed ankaŭ same prezidanto de la Borŝod-Abauj-Zeplén Departementa Teritoria Esperanto Komitato. Pli poste li iĝis direktanto ankaŭ de la Nograd- kaj Heveŝ departementa esperantista kultúra kaj movada vivo. Dum lia prezidanteco li invitis multajn elstarajn individuojn. Inter tiuj gastoj de la Esperanto klubo estis, inter ceteraj: la en vilaĝo Varbó naskita verkisto Gergely, Mihály (†2007), la astronomo Ponori Thewrewk, Aurél kaj Julio Baghy; la kaj hungare kaj esperante verkanta poeto kaj verkisto de teatraĵoj, kiun oni inde notas ankaŭ nuntage: „poeto Petőfi de Esperantistoj”.

Al nomo kaj agado de d-ro Ludovijko Gyóry Nagy, ligiĝas:

- 1, Dum 1960-1980: la enkonduko de lingvo Esperanto, en la lernejan instruadon: en departementoj BAZ en Nordhungario,
- 2, En Miskolc-Tapolca li inaŭguris la Esperanto-Parkon (Bedaŭrinde la urbo ĉesigis ĝin, kvankam anstataŭ ĝi prinomis alian lokon same (terenon inter la strato Bársony János kaj la tramrelparoj), dum la samtempa forpreno de la placnomo Esperanto-placo. La urbestro trabaptis la Placon- Esperanto, al Anna la Sankta, pro peto de la tiea Rom-katolika eklezio.)
- 3, Li sendis proponojn al la urbestro, por la stratnomoj: Esperanto, Julio Baghy, D-ro Kálmán Kalocsay kaj de Ludoviko Király. (Escepte nomon de Ludoviko Király, la urbo realigis ilin, sed nur post morto de d-ro Ludoviko Gyóry Nagy.

Distingoj per honorinsignoj de d-ro Ludoviko Gyóry Nagy estis:

- 1, La 14-an de Septembro de 1964, en la Budapeŝta Scienca Universitato: li ricevis „ordiplomon” „Pro la 50 jara valorega faka agado.”
- 2, La 15-an de Marto en 1973, „Pro lia laboro farita sur tereno de la popolklerigado” li ricevis. distingon „Pro Socialista Kulturo.
- 3, En la Scienca Universitato „Eötvös Lóránd”, la 5-an de Oktobro en 1979; „fero-diplomon” li ricevis „Pro la 65 jara grandvalora advokata agado”.

Mi estas konvinkiĝinta, ke vivojo de d-ro Ludoviko Gyóry Nagy riĉa estis per laboro por la hungara- kaj internacia kulturo.

Tial mi faris proponon al Urbestro de Miskolc, pri la publikarea memorstarigo por li, la Avaŝ-montan ŝtuparvicon prinomi pri li.

Mian peton la urbestro de Miŝkolco plenumis kunsidante la 5-an de Aprilo 2008-a, sed pri la tempo de ties inaŭguro, oni ne decidis ĝis nun. Do, pri tio mi povos informdoni nur post la decido.

Adrienne, sinjorino Pásztor

NI FUNEBRAS

sabaton, la 12-an de f 2008 je 22:11

Arkivita kiel Radio-programo

Lee Chong-Yeong forpasis



Kiel ĉio en la naturo, nia kara korea amiko Lee Chong-Yeong nun foriris el la Tero kaj sekvas sian animan vojon; ĝi estu kia estu! Restas por ni la memoroj pri liaj paŝoj en la vivo, pri liaj bonfaroj rilate al Esperanto kaj liaj familianoj! La skipo de “Parolu, mondo!” deziras al lia familio pacon kaj trankvilon kaj al ĉiuj esperantistoj de Koreio amikajn kondolencojn! Aŭdu kaj vidu tie ĉi nian omaĝon al tiu simpatia kaj kompetenta D-ro.

Ni vin salutas, kara Lee Chong-Yeong

(<http://parolumondo.com/Emilio Cid> (listo Amikema))

Ankaŭ la miŝkolca EAR „Király Lajos” kondolencas pro forpaso de la eminenta samideano!

Paco estu kun li!

Membroj de la EAR el urbo Miŝkolc



Aŭtuno sur la Mortanta riverbranĉo de Tibisko

/ Pentris Klara Domahidi /la verkistino/

Theodor Andreas

Dek kvin principoj de la moderna hejmo

1. Konservu la malordon estas el vidpunkto de tempo multfoje pli ekonomia, ol la prizorgado de ordo.
2. Ĉiu ordo estiĝas el malordo kaj ne estas stabileca.
3. La ordo maltrankviligas, ĉar entenas senĉesan danĝeron de eventuala malordo.
4. La malordo trankviligas kaj peras al vi senton de kontenteco, ĉar ĝi entenas eblecon de ia ordo, kiu estas ĉiumomente sen ia ajn fizika peno imagebla.
5. La malordo estas eterna kaj vivo-kapabla kaj estas ĉiam ŝanĝebla.
6. En malordo oni havas eblecon estiĝi stabilecan harmonion inter viaj propraj bezonoj kaj bezonoj de via ĉirkaŭaĵo.
7. Serĉado de objektoj kaj skribitaĵoj estas agado produktiva, ĉar ĝi devigas okupi nin per objektoj kaj skribitaĵoj, kiujn oni alimaniere trankvile povus ignori.
8. La malordo instruas nin orientiĝi nur inter tiuj objektoj, inter kiuj vere valoras orientiĝi.
9. Tion, kion vi ne forigas per polvosuĉilo, tion vi baldaŭ forigos per lavado.
10. Tion, kion vi baldaŭ ne forlavos, tion vi forpolvosuĉos la venontan fojon.
11. Kion vi ne forpolvosuĉos kaj ne forlavos la venontan fojon, tion forlavos kaj forpolvosuĉos iu

alia alian fojon.

12. Kion ne forpolvosuĉis kaj ne forlavis iam iu alia, tio nerimarkite enkreskos en organismon de via hejmo.

13. Objektoj, kiuj kuŝas sur la planko, ne ĝenas dum la ordigo, ĉar per la movo de la polvosuĉilo aŭ per la movo de la balailo kun humida ĉifono ankaŭ ekmoviĝas.

14. Ĉiuj lav- kaj purigiloj estas malamikoj de la vivo, ĉar ili neniigas grasaĵojn kaj acidojn, kiuj defendas la homan vivon kaj ankaŭ pro tio, ĉar ili neniigas mikroorganismojn, kun kiuj necesas konekzisti en paco.

15. Ekzistas aferoj multfoje pli gravaj, ol la hejma ordo.

□

INFORMOJ

Sportmuzeo

Oni metis la fundamenton de Sportmuzeo en Miskolc. Dum la lastaj jaroj akumuliĝis ege multe da skribitaj kaj fotitaj dokumentaj materialoj, sed ne estis loko, por prezenti ilin. Por tiuj dokumentoj la Sportmuzeo estos la ple taŭga ejo, kie verŝajne la historio kaj reprezentantoj de 32 sportbranĉoj estos videblaj. Sur bone videbla loko estos eksponataj tiuj miŝkolcaj sportistoj, kiuj atingis elstarajn klasigojn dum la olimpiaj ludoj.

(Laŭ numero 29. de 5a jarkolekto de ĵurnalo MINAP./

Granda triumfo

Csaba Német, el Miskolc denove triumfis en la konkurso „Swiss Jura Marathon”. Dum la unuaj ses etapoj de plej longa terenokura konkurso de Eŭropo la Miŝkolca longdistanca kuristo pruviĝis senescepte la plej bona.

Miŝkolca luktisto

La Olimpiajn Ludojn en Pekino povos konkursi en la hungara luktista teamo sep klasikstilaj – inter ili unu virina – kaj tri liberstilaj luktistoj. Ano de ĉi tiu nacia teamo estas la Miŝkolca pezakategoria luktisto, Mikelo Deák Bárdos.

/Laŭ numero 29. de 5a jarkolekto de ĵurnalo MINAP./

Kolonics

Kun konsterno ni ĉiuj aŭdis, ke **Georgo Kolonics**, plurobla kanuista olimpia ĉampiono mortis la 15-an de julio 2008 en Budapeŝto. Li estis 36 jaraĝa, lia koro ĉesis pulsi, dum li preparis sin al la someraj olimpiaj ludoj. La Sportasocio kaj la hungaraj sportŝatantoj adiaŭis kun profunda malĝojo ĉi tiun elstaran figuron de la hungara sporto.

(El TV-programo)

GYÖNGYÖS

En urbo Gyöngyös okazis la 23-29-an de Majo 2008 la 4a Fervojmotiva Ekspozicio. La ekspozicion aranĝis sub la aŭspicioj de la Urba Konsilantaro de Gyöngyös kaj la „Mátra” Kulturcentro la Rondo de Filatelistoj de la Landa Asocio de Hungaraj Filatelistoj kaj „Vincze Bertalan” Filatelista Societo de Gyöngyös. Estas bedaŭrinde, ke la filatelio nuntempe malprogresas kaj eksterlande, kaj enlande, sed kompanse la Motivkolekta Fakgrupo de la Fervojo okazigis ĉi tiun nunan, unikan vidindaĵon. Estas ĝojinde, ke ĉi tiu ekspozicio estas la spektakleca rezulto de komuna agado.

Oni inaŭguris la ekspozicion la 23-an de majo je la 9-a horo kaj tridek minutoj. Ĝin partoprenis centoj da personoj. Dume okazis la premiado de la ekspoziciantoj, per kio oni rekonis la plej belajn motivaĵojn. Post unujara laboro la granda sonĝo de la fakgrupa prezidanto Petro Parragh realiĝis kaj plenumiĝis. Pere de liaj interrilatoj li povis allogi ankaŭ eksterlandanojn, kaj tiel la ekspozicio iĝis internacia. La Internacia Fervojmotiva Grupo (IME) ĉi tie aranĝis sian 42an kongreson. Ĉi tiuj kongresoj estas samtempe ankaŭ festaj kunvenoj, kaj estas aranĝataj ĉiam en aliaj, el fervoja vidpunkto specialaj lokoj.

La ekspozicio vekis atenton pri urbo Gyöngyös. En granda ĉambrego de la Kulturcentro en 107 vitrinoj 16 en- kaj eksterlandaj ekspoziciantoj prezentis siajn varie belajn motivojn, kiuj inde reprezentis la pasinton, nunon kaj estonton de la fervojo.

Miaflanke mi enlistigis apud la fervojon ankaŭ Esperanton. Mia ekspoziciaĵo „Fervojo kaj Esperanto” alvokas la atenton ne nur pri la fervojo, sed ankaŭ pri Esperanto. La fervojon kaj Esperanton estas tre malfacile prezenti, ĉar apenaŭ estas komunaĵoj, kiuj enestas en ambaŭ. Estas bedaŭrinde, ke ĉiam pli maloftiĝas la fervojaj Esperanto-stampadoj, bildkartoj, leterfermaj markoj, ĉar organizantoj de enlandaj kaj internaciaj aranĝaĵoj ne sufiĉe priatentas tion. Oni devus ĉion dokumenti, ĉar la estontaj generacioj scios nur pri tio, kio konserviĝos en la dokumentoj.

Dum la inaŭgurtago de la ekspozicio filmis la Urba Televido. Poste oni artikolis en pluraj gazetoj pri ĉi ekspozicio en Gyöngyös, kaj informis pri la fervojo.

Pri la ekspozicio kiel antaŭvidata okazaĵo aperis sciigoj nur en la gazeto de la Landa Asocio de Hungaraj Filatelistoj MABÉOSZ, en Bélyegvilág (Markomondo) kaj Vasútfila (Fervojista Filatelio), plej ofte nur kun informa karaktero. Bedaŭrinde de esperantistoj mi ne ricevis konfirmojn, mi ne scias, ĉu estis esperantistoj, rigardintaj la ekspozicion. Kiel mi scias, László

Szilvási informis en cirkulero la regionanojn, sed mi ne aŭdis pri partopreno de esperantistoj. En ni regiono funkcias Esperanto-grupo nur en Debrecen. En vilaĝo Ebes nur mi sola estas esperantisto. Mi faras ĉie propagandon por Esperanto. Mi havis Esperanto-ekspoziciojn: en Ebes, Budapeŝto, Debrecen, Nyiregyháza kaj nun en Gyöngyös. Mi povas aranĝi kie ajn ekspoziciojn laŭ deziro.

El ses landoj venis vizitantoj en urbon Gyöngyös, kiuj partoprenis la ekskurson de la Etŝpura Fervojo de Mátra. Ili vizitis en Mátrafüred la Muzeon de Pupoj (kiu estas privata muzeo kaj vizitebla nur post antaŭa interkonsento) kaj en Gyöngyös la Mátra-muzeon kaj monerkolekton. En urbo Eger ili estis invititaj al vinguŝtumo.

A napok elrohtak, a kiállításnak vége, mindenki hazatért. Szerintem a kiállítás elérte a célját. A látogatók között, remélem, sok filatelista, vasutas, vasútbarát és eszperantista csodálta meg a kiállított anyagokat. Akik ott voltak, a kiállításról kellemes emlékekkel távoztak. Értük már érdemes volt dolgoznunk.

La tagoj fluge pasis, la ekspozicio finiĝis, ĉiuj hejmeniris. Laŭ mi, la ekspozicio estis sukcesa, kaj inter la vizitantoj espereble multe da filatelistoj, fervojistoj, fervojŝatantoj kaj esperantistoj admiris la ekspoziciaĵojn. La partoprenintoj havas agrablajn memorojn pri la ekspozicio, por ili jam valoris labori.

Informo de Georgo Heidum (el Ebeŝ), esperantigis László Pásztor

ENHAVTABELO n-ro 8.

(indekso) de la revuo

HUNGARA FERVOJISTA MONDO, 2002 – 2006.

Kunmetis: János PATAY.

- La unua (1957–1971) enhavtabelo aperis en 1972 – en la 1-a n-ro de HFM, – kunmetis Lajos Kökény kaj Pál Kristek;
- la dua (1972–1976) enhavtabelo aperis en 1976 – en la 3-a n-ro de HFM, – kunmetis Lajos Kökény kaj Pál Kristek;
- la tria (1977–1981) enhavtabelo aperis en 1982 – en la 1-a n-ro de HFM, – kunmetis Lajos Kökény kaj Alfonso Pechan;
- la kvara (1982–1986) enhavtabelo aperis en 1987– en la 1-a n-ro de HFM, – kunmetis Alfonso Pechan;
- la kvina (1987–1991) enhavtabelo aperis en 1992 – en la 1-a n-ro de HFM, – kunmetis János Patay;
- la sesa (1992–1996) enhavtabelo aperis en 1997 – en la 1-a n-ro de HFM, – kunmetis János Patay;
- la sepa (1997-2001) enhavtabelo aperis en 2001 – en la 4-a n-ro de HFM, – kunmetis János Patay;

- la **KATALOGO de HUNGARA FERVOJISTA MONDO 1957 – 1996** aperis en 1997 kiel suplemento de la 1-a n-ro de HFM okaze de la 40-jara datreveno de la postmilita hungara fervojista Esperanto-movado; – kunmetis János Patay.

*

Klarigo por facile kompreni kaj uzi la enhavtabelon:

- La familia nomo de la verkanto staras antaŭe per dikaj majuskloj, poste sekvas la persona nomo laŭ la nacia skribmaniero; fine la titolo de la artikolo.
- Post la titolo de la artikolo rolas ciferoj: la unuaj ciferoj montras la koncernan jaron [ekz. 99 = 1999; aŭ 00 = 2000 ktp.] kaj post la duobla punkto sekvanta cifero montras la paĝon [konsideru: en la kvar numeroj de la unuopaj jarkolektoj la paĝoj estas kontinue numeritaj de la unua ĝis la kvara numeroj].
- Kaze de artikolo aperinta sur la kovrilpaĝo estas indikita romia cifero de la kovrilpaĝo, kaj poste inter parentezoj rolas la koncerna numero de la jarkolekto; ekzemple: 02:III.(1), nome la III-a (tria) kovrilpaĝo de la 1-a numero de la 2002-jara kolektaĵo.
-

Distingoj

GULYÁS István: D-ro Imre Ferenczy: Honora Membro de UEA. 03:39.

PATAY János: Ni fieras. 04:62.

PATAY János: Literaturo kaj arta distingoj (I. Domokos, S. Peresztegi).05:62.

Diversaĵoj

GULYÁS István: Pacaj pensoj. 02:II.(1).

BALCZER János: Krucenigmo. 02:III.(1).

Ĉebalta Esperantista Printempo. 02:9.

Alvoko je adresŝanĝo de HFEA. 02:9.

Alvoko je adresŝanĝo de HFEA. 02:15.

Alvoko por renovigi la pacmovadon en Esperantio. 02:16.

Koalicion tutmondan kontraŭ la terorismo. 02:16.

HALÁSZ József d-ro: Kial klakadas la trajno: 02:29.

TOMIŠEK Jindrich: Alloga invito al Ĉeska Lípa. 02:30.

PATAY János: Doktorigo pri veturiloj. 02:III.(2.).

GULYÁS István: Unu paŝo antaŭen. 02:II.(3).

GULYÁS István: Jarfinaj pensoj. 02:II.(4).

PATAY János: Eŭropo-premia urbo invitas kongresi. 02:50; 03:10; 3:40; 03:49; 04:3.

PATAY János: Festo de la mortintoj. 02:62.

CSONKA Lajos - GYIMESI Imre - PATAY János: Ĉu trio? - Tamen! 02:62.

GULYÁS István: La nova horarlibro de MÁV. 03:II.(1).

PHERSY Ferenc: La nigre veturanto... 03:14.

GULYÁS István: Budapest en groteska spegulo. 03:15; 03:32.

GULYÁS István: Feliĉa idioto. 03:II.(1).

GULYÁS István: Kongresaj amaraĵoj. 03:II.(2).; 03:II.(3).
GULYÁS István: Ni laboras efike. 03:II.(4).
GULYÁS István: Du distingoj por Gábor Pál. 03:56.
GULYÁS István: Okdek jaroj ili aktivas por la kulturo. 03:57.
GULYÁS István: Jarfinaj pensoj. 04:II.(4).
DUDICH Endre d-ro: Ĉu la estonto estas en niaj manoj? 04:56.
DOMOKOS Imre: Esperantistoj por kulturo. 04:62.
GULYÁS István: Vintra medito. 05:II.(1).
PATAY János: Memortilio. 05:10.
GULYÁS István: Pri nia historio. 05:II.(2).
DOMOKOS Imre: Kultura vivo. 05:32.
GULYÁS István: Landa Amika Renkontiĝo. 05:II.(3).
HALÁSZ József d-ro: Ni vizitis Litovion. 05:46.
GULYÁS István: Estrarkunsido de IFEF. 05:II.(4).
ALĜUSTIGO. 05:II.(4).
PETHES Imre d-ro: „Laŭ hungare en Eŭropo. 05:56.
DOMOKOS Imre: Nomfesto de Ludoviko (Ludoviko Csonka). 05:59.
PATAY János: Diploma prezentado de aktorstudentoj. 05:64.
GULYÁS István: nI REMEMORU. 06:II.(1).

HALÁSZ József d-ro: La loko de la ci-jara Landa Amika Renkontiĝo: Tokaj. 06:3.
TOMIŠEK Jindrich: Por via distro. 06:III.(1).
GULYÁS István: Jubileo. 06:II.(2).
KOVÁCS Péter: La rivero Bodrog. 06:45.
GULYÁS István: De rennkontiĝo al renkontiĝo. 06:II.(3)
GULYÁS István: Medito pri la meditoj. II.(4).

*

Fakaj konferencoj, kunvenoj

TOMIŠEK Jindrich: Printempa konferenco en Ĉeĥio. 02:25.
TOMIŠEK Jindrich: Ĝenerala kunsido de AFEF en 2002. 02:64.
PATAY János: Ĝenerala kunsido. 02:5.
TOMIŠEK Jindrich - LÁNI Ladislav: 44-a Internacia Fervoĵista Skisemajno. 03:13.
GULYÁS István: Landa Amika Renkontiĝo en la urbo Kaposvár. 3:43.
LÁNI Ladislav: Jarkonferenco en Ĉeĥio. 04:61.
HALÁSZ József d-ro: La loko de la ĉi-jara Landa Amika Remkontiĝo: Tokaj. 06:3.
GULYÁS István: 38-a Landa Amika Renkontiĝo en la urbo Tokaj. 06:43.

*

Fervojo – trafiko – tekniko

TOMIŠEK Jindrich: Kun fervojo al tria jarcento. 02:10.
PATAY János: Eŭropo bezonas fervojon – Hungario kreas eŭropan fervojon. 02:11.; 02:20;
02:35; 03:7. 03:24; 03:30; 03:49; 3:58; 04: 04:15.
HALÁSZ József d-ro: Streĉoj en la reloj. 02:26.
TOMIŠEK Jindrich: Trapasejaj mortigaj akcidentoj. 02:44.

SREDIČ Gvozden: Aliĝo de orienteŭropaj fervojoj al transeŭropaj koridoroj. 02:46.
 KASZALA Sándor: Vojaĝo per „Taurus” 02:48.
 OLSEN E. Henning: Projekto kunlaboro busoj-trajnoj. 02:III.(3).
 PHERSY Ferenc: 115 jaraĝa estas la tramo de Budapest. 03:14.
 OLSEN E. Henning: Kelkaj similecoj kaj diferencoj inter la Nordiaj Fervojoj. 03:44.
 PHERSY Ferenc: Vaporlokomotivo kaj brando kiel fremdultrafika altirforto. 03:46.
 Mag. SREDIČ Gvozden: Ĉu ni vere bezonas ŝvebantajn fervojojn? 03:48.
 KAPCSÁNDI Ferenc: La kvina Eŭropa Koridoro. 03:III.(3).
 TUDORACHE Emil: Rumanio preparas fervojan transporton de la eŭropa grandrapideca fervojreto. 03:63.
 TOMIŠEK Jindrich: Tunelo de la imperiestro. 03:64.
 GIUHAT Rodica: La danubaj pontoj en Rumanio. 03:III.(4).
 STUPPNIG Martin: Fama ekspreso: Transsiberia. 04:14.
 TSCHOM Friedrich: Interŝtata fervojo GySEV - ROeEE. 04:32.
 PATAY János: Fakaj aktualaĵoj. 04:44; 04:64; 05:16; 05:22; 05:39; 05:59; 06:7; 06:29; 06:40; 06:51.
 PATAY János- KRISTÁLY Tibor: Nova jaro - nova horaro. 04:11.
 GULYÁS István: Magleva trajno Linimo baldaŭ debutos en la gubernio Aichi. 04:48.
 HALÁSZ József d-ro: Nova horaro – dekumitaj trajnoj. 05:8.
 PATAY János: Renoviĝas la ĉefstacioj de Budapest. 05:21; 05:44.
 PATAY János: Jubileas la fervojlinio Mezőtúr-Szarvas. 05:62.
 PHERSY Ferenc: Renoviĝas la Norda Fervojponto de la Danubo en Budapest. 06:13.
 WEN Zhihong: Ĉe prova funkciado de la Qinghai-Tibeta Fervojo. 06:55.

*

Gvidartikoloj

GULYÁS István: Sojle de la nuna jaro. 02:1.
 GULYÁS István: Bulgario gastigis la fervojistajn esperantistojn. 02:17.
 GULYÁS István: Landa Amika Renkontiĝo. 02:33.
 STUPPNIG Martin: La estontaj kongresoj de IFEF. 02:49.
 GULYÁS István: Nova jaro, novaj taskoj! 03:1.
 GULYÁS István: Fervojistaj esperantistoj kongresis en Germanio. 03:17.
 GULYÁS István: La 88-a Universala Kongreso de Esperanto. 03:33.
 PATAY János: Eŭropa-premia urbo invitas kongresi (kvina parto) 03:49.
 GULYÁS István: Novaj defioj por la nova jaro. 04:1.
 GULYÁS István - PATAY János: Komune aranĝita IFEF-kongreso okazis en Sopron. 04:17.
 GULYÁS István: Brila jaro estis 2004, kia estos 2005? 05:1.
 GULYÁS István: Centjariĝa renkontiĝo en Boulogne-Sur-Mer. 05:17.
 GULYÁS István: Unuafoje kongresis IFEF en Rumanio. 05:33.
 GULYÁS István: Jubilea universala kongreso de Esperanto en Litovio. 05:49.
 GULYÁS István: Pasitjaraj rezultoj – novjaraj planoj. 06:1.
 GULYÁS István: Denove Ĉinio. 06:17.
 GULYÁS István: La 91-a Universala Kongreso de Esperanto. 06:33.
 PATAY János: Kvindek jaroj de la Hungara Fervojista Mondo. 06:49

*

Historio – jubileoj

- BARDOCZ Erika: Reen al la radikoj. 02:41.
Festo de la hungaraj fervojistoj. 02:43.
FERENCZY Imre d-ro: Kvindek-jara jubileo de FISAIC. 02:58.
KORSÓS Ágnes d-rino: Antaŭ cent jaroj naskiĝis Lajos Korsós. 02:61.
Naŭdek-jara estas László Zseni. 03:28.
PHERSY Ferenc: Kiuj ni estas hungaroj? (serio pri historio de hungaroj). 03:52; 04:7; 04:28; 04:28; 04:40; 04:51; 05:12; 05:28.
SZEKERES Ludoviko: 135-jara jubileo de fervojlinio Szeged-Szabadka-Zombor. 04:60.
OROSZ Károly: Fervojhistorieto. 05:9; 05:24; 05:40; 05:58; 06:4; 06:32; 06:III.(3.); 06:53.
PATAY János: Fervojista Festo 2005. 05:55.
PATAY János: Sesdekjara estas la Simfonia Orkestro de MÁV. 05:60.
PHERSY Ferenc: Maljuna novaĵo sur eta fervojo. 05:III.(4).
MÁTÉ Árpád d-ro: Duobla jubileo de Kálmán Kaolcsay. 06:9.
OROSZ Károly: Antaŭ ducent jaroj naskiĝis grafo Imre Mikó Hidvégi. 06:12.
PATAY János: 125 - 250. (Béla Bartók kaj W. Amadeus Mozart). 06:26.
PATAY János: 160-jara jubileo de la hungara fervojo. 06:41.
SUTKA István: Konciza historio de la Fervojista Fakgrupo Kiskunhalas-Kelebia. 06:46.
PATAY János: Kvindek jaroj de la Hungara Fervojista Mondo. 06:49
GULYÁS István: Pasintjaraj rezultoj – Novjaraj partoj. 06: 1.
CSISZÁR Ada: Antaŭ 115 jaroj, la 6-an de oktobro 1891 naskiĝis Kálmán Kalocsay. 06:57.

*

Kongresoj

- GULYÁS István: Ek hungaroj! 02:II.(2).
TOMIŠEK Jindrich: Plovdiv atendas nin. 02:8.
GULYÁS István: Bulgario gastigis la fervojistajn esperantistojn. 02:17.
GULYÁS István: Brazilo estas la lando de mirakloj. 02:39; 02:53.
FERENCZY Imre d-ro: 41-a FIRAC-Kongreso en Sopron. 02:59.
GULYÁS István: Fervojistaj esperantistoj kongresis en Germanio. 03:17.
PHERSY Ferenc: 33a Hungarlanda Esperanto Kongreso. 3:27.
GULYÁS István - PATAY János: Komune aranĝita IFEF-kongreso okazis en Sopron. 04:17.
GULYÁS István: Ĉinio denove el proksimeco. 05:3.
BARTLING Inge: Iom pri postkongreso... 04:25.
GULYÁS István: Ĉinio denove el proksimeco. 04:33; 04:49.
GULYÁS István: Denove Ĉinio. 06:17.
GULYÁS István: La 91-a Universala Kongreso de Esperanto. 06:33.
PATAY János: Kvindek jaroj de la Hungara Fervojista Mondo. 06:49.

Lingvo

HASZPRA Ottó d-ro: La utilo de Esperanto. 02:6.
PATAY János: Stranga aventuro, kiu malkaŝas grandan trezoron. 06:62.

Literaturo

PATAY János: Miraklofonto. 03:6.
PATAY János: Ĉu kreskos arbo el grajno? 03:62.
MAUPASSANT de Guy: Sur la maro. (Rakonto) 05:26.
HALÁSZ József d-ro: Okazo de la misvojaĝinta varmeg-aera balono. (Rakonto) 05:III.(2).
KALOCSAY Kálmán d-ro: Kongresa runo (poemo). 06:11.
KALOCSAY Kálmán d-ro: La hungara Himno. 06:60.

Medicino

PATAY János: Malgraŭ koroperacio – moviĝo je recepto (I. Dudás). 04:59.
VISI Ferenc: Konciza historio de la Fervoĵista Memvole Protekta Fonduso. 06:14.

Movada vivo

HALÁSZ József d-ro: Somerfina Amika Renkontiĝo. 02:3.
SUTKA István: Fortostreĉa ekskurso. 02:4.
ROSSLER Franz-Georg: Esperanto - ponto inter lingvoj, kulturoj, homoj. 02:32.
GULYÁS István: Estrarkunsido de IFEF. 04:II. (3).
FERENCZY Imre d-ro: Ludoviko Csonka en la Esperanto-movado. 04:39.
PATAY János: Kariero de fervoĵisto (József Nagy). 05:43.

Nekrologoj

GULYÁS István: Henning Hauge (1935-2003.) 03:47.
FARKAS-TATÁR Éva: Papp Tibor (1947-2003.) 03:47.
HFEA.Estraro: Forpasis nia honora prezidanto Joachim Giessner. 03:6.
HFEA-Estraro: László Zseni (1913-2004). 04:11.
HFEA-Estraro: Károly Fajsz (1911-2004). 04:III.(1).
HFEA-Estraro: Oszkár Princz (1947-2004.). 04:III.(3)
HFEA-Estraro: János Károlyi (1935-2004.). 04:III.(3).
HFEA Estraro: D-ro György Ferencz (1908-2005.). 05:III.(2).
HFEA Estraro: Ludoviko Csonka (1928-2006). 06:III.(2).
HALÁSZ József d-ro: István Temesi (1925-2006).
HFEA: Sándor Kovács (1927-2006). 06:61.

Sporto

PATAY János: Renovigita sporthalo en Dombóvár. 02:III.(2.).

La faka revuo
Hungara Fervoĵista Mondo
efektivigu sian destinon ankaŭ dum la sekvontaj kvindek jaroj!!!
* * * *



Sunsubiro – Pentris Klara Domahidi la verkistino

Adri Pásztor

Castro kaj Kristo

En la urbo Split pasigita unu semajno la vetero estis varia: foje varmete pluva, venta, aliam sunradia, 37celsius grada varma vetero. Kiel malmultmonon havanta hungara turisto mi pridecidis por piedmarŝi proksimume sep kilometrojn de nia motela tranoktejo al la interna urbo. Ne uzonte al la vojaĝo aŭtobuson, la de tielmaniere ekŝparota mono mi povos aĉeti sur la propra arbo maturiĝintan veran mioldolĉan oranĝon.

Nu, mi agis tiel. Kiam mi ekiris, frumateno estis, varmeto, iom blovis. Sed la vetero rapide varmiĝis. Mi piedmarŝis, kiel eble rapide. Sed, je la lasta triono de la vojo mi eksuferis pro varmego.

Pli frue mi eksciis, ke tiutage grupo veturonta estos de la ŝiphaveno en urbon Trogir. Tiun mi planis partopreni, krome mi volis renkontiĝi kun iu kroatia esperantisto, kiu nur tiam havis tempon por mi. Sed la sorto disponis aliel.

De antaŭ la bakaj sunradioj kaj pro ioma laceco, mi serĉis sidlokon en la apudvoja arba-arbeda areo. Fine mi trovis la konvenan lokon. Mi sidiĝis sub la arbo kaj jam ripozis kelkminutojn, kiam iu metis sian manon sur mian dekstran ŝultron. Poste evidentiĝis, ke ne homo, sed unu granda luphundo staris apud mi. Mi ekparolis, por tankviligi min mem, kaj la hundon. Nature, hungarlingve. Je mia voĉo aperis soldato. Mi devis legitimi min, kiu mi estas kaj kial mi estas tie. Je mia redemando mi eksciis, ke li estas hungardevena soldato, kiu nun servas kiel gardisto, ĉar post kelkaj minutoj oni atendas tien kamaradon Fidel Castro.

Mi komprenis ankaŭ tion, ke mi ne licas foriri, eĉ moviĝi ne. Do tiel okazis, ke la soldato kaj la luphundo staris antaŭ la gardista budo, mi kuŝis sur ventron malantaŭ ili sur la herbo sub la arbustbarilo. Post nelonge venis Fidel Castro inter soldatoj. Kun elegantaj soldatpaŝoj li marŝis for antaŭ mi je pr. en tridek metra distanco. Poste aŭdiĝis kanonpafoj, kiuj surdigis min, longe mi nenion aŭdis. Do, mi adiaŭis de la soldato kaj ekiris al mia celo, nun jam freŝe.

Alveninte en la enhavenon, mi eksciis, ke la trogira grupo jam foriris, kaj ankaŭ la esperantisto. La por li portitajn donacojn: la brodaĵojn mi enportis en iun splitan promenadejan butikon kaj proponis al aĉeto. La butikistino tre ĝojis al la brodaĵoj kaj la afero aranĝiĝis inter ni. Ŝi poste proponis al mi por viziti Etnografian - muzeon. Mi havis tempon, do mi iris tien. Tie evidentiĝis, kial sendis min tien la butikistino. Antaŭ multaj jaroj en certan teritorion de Kroatio el la hungara Mezőkövesd, kelkaj familioj estis translokiĝintaj. Ili vere ensolviĝis en la ilin ĉirkaŭantaj popoloj. Ili ne havas jam ilian propran lingvon. Sed ilian kulturon ankaŭ nun havas. La brodaĵmotivojn kaj la kutimojn, kantojn - ili gardas ĝis hodiaŭ, kaj ankaŭ al la estonto volas ekgardi.

Post la muzeo vizito sur la vendoplaco mi ekaĉetis la deziritan bongustan oranĝon.

En la enhaveno irade, gapade mi ekrigardis grandan ŝipon. Oni diris, ke tiu pramŝipo havos ses horan vojaĝtempon tien-reen. Mi tuj decidis kaj aĉetis bileton por tiu vojaĝo, kaj post dek minutoj la ŝipo elveturis de enhaveno de urbo Split. Mi ne sciis, ke unufoje je kio mi atentu, kion admiru. Ĉu je la multspeciaj subakvaj kreskaĵoj, ŝtonoj, fiŝoj de Adria maro, ĉu je sur la ŝipo vojaĝantoj, ĉu je brilo de la neĝblankaj muroj de la foraperanta urbo Split?

Dum la vojaĝo unu post la alia ĉion mi rigardeblis. La tiun koloran marakvon, kiun nia hungara pentroartisto Csontváry ekpentris, mi vere ektrovis en la naturo. La infangrupo estis sinvestita en blankaj ĉemizoj ornamite per vizaĝbildoj de Nikolao Zrinyi kaj Francisko Frangepan. La infanoj gajnis historio konkurson. Iliaj premioj konsistis de la ornamitaj ĉemizoj, kaj la supetara vojaĝo.

Proksimiĝante al rezidejo de Brat' insulo al Supetar, ĉirkaŭ flugis nin la mevoj kaj de la foro videbliĝis jam la neĝblankaj muroj kaj ruĝtegmentoj de la domoj. Ni vidis inter la tiujn ĉirkaŭantaj pinarboj ankaŭ multajn rozkolorajn oleandro arbojn. La tuto ŝajnis, kiel juvelo.

En la enhaveno oni diris, ke ĝis reiro de la pramŝipo mi havos nur unu horon. Je mia demando: kio indas ekrigardi dum unu horo, oni sendis min en dekstran direkton Mi ekiris kaj atingis la tombejon. Tie la tombmonumentoj la samaj estis, kiel en niaj tombejoj. Sed, inter la tomboj multegaj florantaj oleandro - arboj odoris. Estis tie blankaj, buterkoloraj, rozkoloraj kaj ties variantoj. Iuloke mi vidis ankaŭ helan turkisbluan koloran. Mi neniam penseblis, ke tia kolora floro ekzisteblas. Mi ĝuis la flormaron apud Adria maro. Kaj subite mi ekrigardis etan kapelon. En ĝi el marmoro skulptitan Kriston. Ĝin kreis Ivan Meštoviĉ skulptoartisto. Simile belan al tiu skulptaĵo mi neniam vidis. Mi rigardis pie tion. La koloro kaj la vaskularo de la marmoro preskaŭ la sama, kia estas de la vivanta homo. La homaj anginoj blue diafanis tra la haŭto. Kristo estas la unika dia homo de la sufero, la pardondono kaj la kvietiĝo. Kun retenata spiro mi staris tie, staris antaŭ li.

De tie maldekstre apud ies tombo el bronzo farita alia Kristo skulptaĵo estis, de Ivan Meštoviĉ. Majstre verkita estis ankaŭ tio.

La unu horo rapide forpasis. Mi adiaŭis de Supetar kaj sur la ŝipo reiris al Spalato (Split).

Dumvoje mi pripensis kia interesa estas la vivo. Se mi forvojaĝintus al Trogir, mi certe ne videblintus Etnografian muzeon kaj Supetaron. Mi vere ne bedaŭris la ŝanĝon, ĉar akiris senparajn, neforgeseblajn travivaĵojn.



Split

2008: estas ankaŭ, jaro de la akvo
Tata, kiel urbo de parkoj, muzeoj kaj akvoj,
kie okazis la Internacia Amika Renkontiĝo de la Esperantistaj Fervojistoj, inter 27-29
de Junio 2008.

Ĉe piedo de la montaro Gerecse, sur ambaŭ bordoj de Öreg-tó (Olda lago) taŭga ankaŭ por velado, kaj ĉirkaŭ la malnova fortikaĵo elformiĝis el tri urbetoj (nome Tata, Tóváros kaj Várpalota) unu el la plej belaj urbetoj de Norda Transdanubio. Nuntempe Tata havas pli ol 25 mil loĝantojn.

Tata apartenis al la latifundio de la familio Csák ekde la 11-a jarcento ĝis 1326, kvankam ĝi estis havaĵo (bieno) de la reĝa familio de la Arpadoj. La konstruado de la fortikaĵo okazis dum la regado de la anĝevina reĝo Ludoviko la Granda (1342--1382). Dum mallonga tempo ĝin posedis la palatino István Lackffy (1388--1397). Post ties ekzekuto pro ŝtatperfido Tata iĝis denove reĝa bieno. Ĝi estis la ŝatata restadejo de reĝo Sigmundo. Tiatempe elformiĝis la kvarangula fortikaĵo kun internaj turoj. Post la morto de reĝo Sigmundo, en la manoj de István Rozgonyi, la kolonio estinta "civitas" (blazonhava urbo) ekde la jaro 1388, komencis rapide pereii.

En 1463 reĝo Matiaso Hunyadi reaĉetis la urbon kaj la kadukiĝantan fortikaĵon. Krom la kastelo en Visegrád, Tata estis lia ŝatata loko de ĉasado kaj ripozejo. Post la katastrofo perdita batalo ĉe Mo-hács (1526), dum la 145-jara turka regado ĝi ofte ŝanĝis estron. Fine en 1683 la turka veziro Kara Mustafa, marŝanta por sieĝi Vienon, eksplodigis la fortikaĵon.

La novtempa disvolviĝo de la urbo komenciĝis en 1727, kiam grafo József Eszterházy aĉetis ĝin bienon. Famaj arkitektoj: Jakab Fellner, Antal Schweiger; inĝenieroj: Sámuel Mikoviny, Ferenc Böhm kreis la barokan etoson de la urbo, konstruante domojn, kastelon, preĝejojn ktp. Ankaŭ nuntempe tiuj malnovaj konstruaĵoj kaj la muelejoj funkciigataj per akvo ekkaptas pleje la intereson de la vizitantoj. Tata zorge konservas kaj gardas la memoraĵojn de la iamaj hungaraj reĝoj. En la fortikaĵo-kastelo troviĝas nun la Muzeo de Domokos Kuny, kie videblas ankaŭ trevejoj el-antaŭ de la hungara patrujkonkero. En la malnova sinagogo estas montrataj kopioj de antikvaj statuoj. Famaj estas la vazoj de la potfaristoj de Tata, kaj la artaĵoj de la esperantistaj pentristoj de la urbo. Ĉe la lagobordo funkcias la trejnejo de la altkvalitaj sportistoj pretiĝantaj al la olimpiko.

Ĉe Kalvaria monteto, sur kiu staras kapelo kaj akvoturo, estis konstruata Subĉiela Geologia Muzeo, la vera Ĵurasaj Parko, laŭ iniciato kaj projekto de geologo-akademiano József Fülöp, kun sikula pord-ego kiel enirejo. Tie oni povas studi tavolaron de Transdanuba Mezmontaro, preskaŭ identa al tiu de la Sudaj Alpoj:

- blanka, malfru-triasa kalkoŝtono de Dachstein (en kiu disvolviĝis karstaj grotoj),
- rozkoloraj, ĵurasaj kalkoŝtonoj (de "kondensita" sedimentiĝo),
- verdec-griza, fru-kretacea sabloŝtono.

La mez-ĵurasajn radiolaritojn (fajroŝtonojn) ekspluatis jam la neolitikaj homoj.

La vizitantoj povas ekkoni ankaŭ kelkajn mineralajn krudaĵojn, kaj eĉ preni el ili provpecojn.

(Ködmön-Dudich, www.hungario.hu)

La ĉijara Internacia Amika Renkontiĝo de la Esperantistaj Fervojistoj, inter 27-29 de Junio 2008

Laŭ pridecido de la gastoakcepto, ĉe la trajno atendis nin la gastoakcepton plenumanta samideano Jozefo Trnka, kiu peraŭtomobile portis nin kaj ankaŭ la aliajn gastojn alvenintajn trajne, al la akceptejo en la Öregtő (Maljuna Lago) dustela hotelo de la lagborda kampadejo, kiu estas en la proksimeco de la „Vosto (fino) de la lago”. Post nia lokiĝo en la kvarlita ĉambro kie ni dormis kun alia geedzoparo, s-ino Eva Faragó, unu de la ĉeforganizantoj per propra aŭto portis nin en la urbocentron, por urbrigardi. Post nia adiaŭo ni vizitis inter la diversaj urbaj vidindaĵoj, la fortikaĵon de Tata. Ĝuste tiam kaj tie okazis la granda urba aranĝaĵo, la Florfestivalo, en kadro de la Festivalo Akvo-Muziko-Floro. Ni povis finrigardi la belejn ekspoziciitajn florzonojn kaj la diversajn aliajn ekspoziciojn. Post fino de nia fortikaĵa promenado, agrabla elvido okazis en kafejo de la plej supra teraso de la fortikaĵo.

La renkontiĝon organizis la *Esperanta Asocio de Tata kaj sia Ĉirkaŭaĵo*. La organizantoj (inter ili la ĉeforganizantoj s-ino Elizabeto Ködmön kaj f-ino Éva Faragó) zorgis pri altkvalita programo por la ĉ. 70 partoprenantoj. Inter la gastoj partoprenis kaj hungaroj, kaj eksterlandanoj. Laŭ mia scio la partoprenantoj alvenis el: Aŭstrio, Ĉeĥio, Pollando, Slovakio kaj Hungario.

Inter la hungaraj gastoj ĉeestis Jozefo Bakša, la prezidanto de la Hungaria Esperanto-Asocio. Sinjoro d-ro Endre Dudich kaj s-ino Magdalena Feifichová (Slovakio) salutojn sendis al la partoprenantoj. Vendredvespere, post la unua komuna vespermanĝo, ni iris al la lagborda Muzikfestivalo. Dume ni rigardis la de posttagmezo ankaŭ tiam naĝantajn reĵipojn sur la lago, kaj aŭskultis la agrablan muzikon.

Sabate, post konsumo de la vere elektema kaj delikata matenmanĝo ĉe la libera bufedo, okazis urborigardado per urbrigarda etrajno: „Dottó”, kiun disponigis la urba registaro senpage por la aranĝaĵo. Dum tiu urborigardado la partoprenantoj povis aŭskulti esperantlingvan klarigadon de la urbhistorio kaj vidindaĵoj, fare de Aleksandro Horváth.

Finante la urborigardadon, ni reiris en la hotelon, kaj post la bongusta tagmanĝo ni esperantistoj ekveturis al urbo Bábolna per aŭtobuso. Post agrabla veturo malgrau la varmego ni vizitis la ĉevalfarmon, la arboreton, en ĝi la bestoparkon, la ĉevalistan muzeon kaj la muzeon de ĉaroj. Pri la prezento de ĉevalfarmo zorgis lokaturisma gvidisto. Li lerte kolorigis per anekdotoj la lok- kaj ĉevalfarmhistorion. La simpatia junulo d-ro Jozefo Bacsárdi lerte klarigis esperantlingve la historiojn de la vidindaĵoj al la eksterlandaj gastoj, tuj tradukante la hungarlingvan parolon de la ĉiĉerono.

Post la ekskurso en Bábolna, antaŭ la vespermanĝo vingustumado okazis. Sed ĝin antaŭis la rezultanonco de la vin-toto, kiun gajnis per 12 punktoj, la geedzoj loĝintaj en la sama ĉambro kun ni. Ili alvenis el loko de la mondfama hungara arbareto de Vác-rátót. Poste ĉiu ĉeestanto povis ĝui kelkajn gutojn el inter la vinspecioj de la vilaĝo Keszölc. Estis krome ebleco aĉeti el la kolektaĵo kelkajn botelojn ornamitajn per esperantlingva etiketo.

La vingustumadon sekvis la prezentado de maĵoretoj (marŝdancistoj). Poste la koruso Egressy disponis korusajn verkojn esperantlingve kaj hungare, gvidanta de la vicurbestrino s-ino Zsuzsanna Robozné Schönfeld, krome la himnon Esperantan ni kantis kune kun la ĥoruso.

Post la kantoj de koruso denove aperis la maĵoretgrupo „Dunakanyar” (Danubkurbiĝo) prezentante ventrodancon kun turkmuzika akompano. La publiko surprizite kaj unuanime forte manklakadis. La dancistinoj, kiel fleksiĝantaj floroj en la vento, per la dumdance diversmaniere movigitaj belkoloraj vualoj tre bele aspektis, ravis la publikon, kiu unuanime

forte manklakadis, eĉ ankaŭ unufojon remanklakadis la dancistojn al denova dancado. Post la majoret-dancado sekvis liberbufeda malvarma vespermanĝo, kaj poste la tombolo, dum kiu oni disdonacadis al la gajnintoj kelkajn belegajn pentraĵojn de esperantistaj gepentristoj de Tata. La sabatvespero fermiĝis per balo.

Dimanĉe, antaŭtagmeze okazis la laborkunsido de la Hungara Fervoja Esperanto-Asocio. Lingvo de la kunsido estis Esperanto. Unue la vicprezidanto de IFEF; István Gulyás salutis la ĉeestantojn, pritaksis la pasintan duonjaran agadon, rezultojn kaj raportis ankaŭ pri eventoj de la 60-a IFEF-Kongreso (Internacia Fervoja Esperanto Federacio). Post lia raporto la eksterlandaj kaj hungaraj partoprenantoj salutis la tie alvenintajn partoprenantojn, eksplikis siajn opiniojn pri demandoj de la fervoja esperanto-movado. La partoprenantojn de la laborkunsido alparolis ankaŭ Jozefo Baksa la prezidanto de HEA. Li invitis la esperantistojn por partopreni la IRIS Festivalon en urbo Szolnok. Adrienne s-rino Pásztor post sia saluto (kaj transdono de salutoj de s-ro Dudich kaj Magdalena Feifíčová) invitis al Abaujszántó, kie estos aranĝota la jubilea festo de la 25 jariĝo de la Memorĉambro pri d-ro Kolomano Kalocsay, la 27-an de Septembro 2008.

La Internacia Amika Renkontiĝo de Fervojistoj en Tata, fermiĝis per tiu konsento, ke ili renkontiĝos ankaŭ sekvajare, sed aliloke.

Adrienne, s-rino Pásztor

INFORMO

de: Massimo Ripani <massimo.ripani@gmail.com>

SEMAJNO DE KULTURO INTERNACIA Pizo/Pisa (Italujo), 18-24 septembro 2008

De ĵaŭdo, la 18-an de septembro ĝis merkredo la 24-an, okazos en Italujo nova junulara aranĝo, iom malsimila de la ĝisnunaj. Ĝia nomo estas 1-a Semajno de Kulturo Internacia (SKI), sed ĝi ne okazos sur neĝo...

Mallonge: urbestroj de 6 urbetoj proksimaj al Pisa (San Giuliano Terme, Cascina, Vecchiano, Calci, Vicopisano, Buti) invitas 25 junajn esperantistojn ne-italajn kaj 10 italajn dum unu semajno al siaj urboj por prezenti siajn kulturojn kaj Esperanton al la lokaj mezgradaj lernantoj kaj al la loka junularo ĝenerale.

Ili pagos ĉion surloke (de alveno ĝis foriro: manĝoj, dormoj, moviĝoj), interŝanĝe de tiu "kultura laboro".

Sekve, ni ne petas aliĝojn (vi devos pagi nenion al ni, nur zorgi alveni ĝustatempe...) sed kandidatiĝojn - ĉar nia respondecado (de Itala Esperantista Junularo) estas provizi kiel eble plej "varia" kaj "kvalita" partoprenantaro, ankaŭ ĉar aliaj urbestroj italaj jam enviciĝis por ripeti la eksperimenton estonte. Inter la kandidatoj oni rapide elektos la partoprenantojn. Pliajn informojn vi trovos baldaŭ ĉe ski.esperantoitalia.it

Renato Corsetti/Korseti, Via del Castello, 1, IT-00036 Palestrina
Italujo <renato.corsetti@esperanto.org>

Denove pri la Zamenhof –Trajno



La fotojn sendis: Robert Kaminsky (Pollando)

Füle, Lajoŝ Ekzistas luktoj spiritaj

Ekzistaj luktoj spiritaj,
kiuj decidas ion,
kiam IU al ni spektas
kiel LUMO en foro.
Kiam ni ricevas forton,
por batali, suferi,
kiam en ni, pere de ni
IU scipovas venki.

(La poemon esperantigis el la hungara originalo Julianna Vas-Szegedi – aperis en: Brilantaj Steloj 1 – en urbo Szolnok)

„IRIS” ESPERANTO-FESTIVALO-Szolnok

Du anoj de la miŝkolca „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo, geedzoj-Pásztor partoprenis Esperanto-Festivalon „Iris” en urbo Szolnok dum ties unuaj tri tagoj.

La festivalo komenciĝis la 7-an de Julio 2008 dume 45 peraonoj alvenis el inter la anoncitaj partoprenantoj.

La organizantoj organizis la gastoakceptadon lerte, ĉar simile al aranĝaĵo de Tata ankaŭ ĉi tie ili atendis la gastojn en la fervoj- kaj aŭtobusstacioj kaj transportis tiujn per aŭtomobilo al la kolegio, kie la festivalo okazis.

Sed tie ne akceptis la gastojn esperanta flago – kiel en Tata – kaj ne informis la homojn, ke en la kolegio Esperanto-aranĝaĵo okazas. Sed tio estas bona, ke ni ne aŭdis hungaran vorton, kio

povas prui tion, ke por ĉiuj estis unuranga la ekzerco de la esperanta lingvo kaj neniu uzis la nacian lingvon.

Vespere de la unua tago la interkonatiĝan vesperon Jozefo Eszényi, vicprezidanto de HEA inaŭguris. Li parolis pri la ĝistiamaj samaj aranĝaĵoj, pri celoj de la festivalo, li atentigis pri tio, ke la programo de la festivalo estas legebla ĉe enirejo de la kolegio kaj eblas anonci ĉe Ferenc Harnyos kaj ĉe li la partoprenajn emojn en la diversaj programoj.

Okaze de la prezentiĝo la ĉeestantoj jam unupartite ekkonis unu la alian. La Interkonatiĝon Emerigo Szabó gvidis, kiu petis la ĉeestantojn, ke ĉiu parolu unu post alia pri sia Esperanto-agado. Ĉi tiel ni informiĝis pri ĉiuj pli precize, ol okaze de la persona prezentiĝo.

Sekvatage ni vizitis unuan horon de Esperanto-lernokurso de sr-o Stanislaw Mandrak, pola eseperantista instruisto. Ni povas diri, ke la instruado atestadis pri tio, ke li havas bonegan lingvokonon kaj pedagogian senson. Ni estis kontentigaj pri lia instruado, kio okazis laŭ la Ĉeh-metodo. Ankaŭ la gestudentoj de la kurso estis lertaj, ĉar dum la sekvataga redemando kaj ĉe instruado de la nova studmaterialo ili bone utiligis la ellernitajn konojn.

Bona etoso regis kaj dum la urborigardo kaj dum la libera programo.

Estis ĝuinda la ekspozicio de pentraĵoj de la belartistoj kadre de „Muzea somero-Szolnok” en la Fervoja Kulturdomo. Ni partoprenis inaŭguron de la ekspozicio de Jozefo Cseh, kie ni povis admiri ankaŭ portretpentraĵon de L.L.Zamenhof. Rolis ankaŭ Anjo Amika, la fama esperanto-kantistino, krome la artista geedzoparo de „Amikeco” Esperanto-klubo de Szolnok.. Sekvatage Jozefo Cseh, esperantista pentroartisto prelegis pri formoj de la humoro, kiuj aperis en Esperanto-verkoj. (Ekzemple: La Mondo Ridas, Esperanto -Ŝercoj, Paŭlo Lengyel: Libro de Humoraĵoj, El La Verda Biblio, Sándor Szatmári: Vojaĝo en Kazohinio, Anekdotoj el la Fundamenta Krestomatio de Zamenhof, vortludoj de diversaj aŭtoroj, ...ktp) Ni ege ĝuis la bonegan prelegon.

La infano-partoprenantoj estis tre lertaj, ĉar faris pentraĵojn, faris el lignokuleroj pupojn kaj el modlaĵo diversajn aĵojn, grandsukcese. Ni povis vidi nun, ke ankaŭ niaj idoj estas lertaj kaj trovemaj. Okaze de tiu ĉi ni gratulas al ili.

Dum la tria tago, antaŭtagmeze estis ebleco por aĉeti librojn. En Beogrado vivanta **Tereza Kapista** alportis libron de Tibor Sekelj, „Temuĝin, filo de stepoj” titolan, kaj de ŝi mem skribitajn librojn por ekkoni tiujn ankaŭ partoprenantoj de la festivalo.

Ni estas kontentaj pro la organizado de nia restado tie. Ni dankas la kunlaboron de la organizantoj kaj amikecon de la ĉeestantaj esperantistoj.

Ni deziras same multe da sukceso al la pluaj aranĝaĵoj:

Geedzoj-Pásztor – el Miškolco



Tereza Kapista (eldonistino de la libroj de Tibor Sekelj), Enikő Zengő-Sereghy (instruistino el urbo Nyíregyháza) kaj geedzoj Pásztor videblas sur la fotoj. La fotojn sendis s-ino Tereza Kapista

Ĉu vi scias, ke la geometria mezo de Eŭropo estas ĝuste en Hungario?

Do, antaŭ kelktagoj ni estis tie en la vilaĝo de regiono Nordhungario, kaj en sia hejmo ni vizitis la pensiulitan instruistino Kalina, Ferencné, kiu gvidas la popolkant-koruson „Kővirágok” (Ŝtonfloroj”). Ni demandis ŝin, kiujn aranĝaĵojn ili havos en la dua duono de ĉi jaro. Ŝi, multkolora parolis al ni ankaŭ pri la nuna vivo de la vilaĝanoj, kaj pri tio, ke la 7-an de Julio ŝi – kune kun sia filo Ferenc Kalina – organizis popolmuzikan konkuron: Kiu kion scias?- je memoro de Zoltán Kodály. La ĉefprotektanto de la aranĝaĵo estas d-rino Judit Szóráth, la parlamenta deputito de vilaĝo Tállya, kiu estas ankaŭ la prezidanto de la ĵurio.

La 20-an de Septembro havos ili unu grandan aranĝaĵon, al kiu la Popolkant-grupojn atendas gastojn: sep korusojn el diversaj regionoj de Hungario. Tiuj alvenos el: Sellye, Zalakomár, Pálháza, Abaujszántó, Sajóvamos, Nyírlugos kaj Érpatak. Por Popolmuzika Renkontiĝo je la 20-a de Aŭgusto en la vilaĝo Tállya, la Evangelia preĝejo donos scenejon. Ni informiĝis ankaŭ pri tio, ke la evangelia pastro Gabrielo Mezei estas tiel entuziasma, ke li certigas lokon al artaj provoj de la popolkant-grupo en la eklezia lernejo, kaj li pendigis kaj sur la murojn de lernejo kaj de la preĝejinterno la distingajn honorinsignojn kaj rekonajn diplomojn de la popolkant-rondo jam kreanta kulturhistorion, kaj tiuj estas tie rigardeblaj.

Tiu Popolkantista renkonto je la 20-a de Septembro, daŭros de la 11-a ĝis la 17-a horo, kaj intertempe okazos komuna tagmanĝo por la partoprenantaj grupoj kaj la invitituloj.

S-rino Kalina, Ferencné fiere menciis la valorojn de la vilaĝo: kiuj unu post la alia kreiĝas frukte de komuna agado de la vilaĝanoj, kaj samtempe tio de la efika rolo de la gastobelartistoj.

Ladislao la Sankta, estas la patrona sanktulo de la romkatolika preĝejo, tial gravaj estas ankaŭ la Ladislao-tagaj festenoj. La kasteleto Rákóczi, kaj la kastelo Maillot same estas trezoroj de la vilaĝo. Sur la malnova ĉefplaco menciindas ekrigardi, la renovigitan Vitkulturisto-domon. Apud ĝi staras la reformata preĝejo.

La allogforton pliigas la Vilaĝ-domo, kaj la multaj lignoskulptitaj kreaĵoj, kiuj ornamas la vilaĝon. Ankaŭ la kreaĵoj de la belaj popolaj kaj nobelaj brodaĵoj estas meritinde famaj. La konstruantoj kaj prizorgantoj de la floraj parkoj, la mondfamaj vinkeloj kaj vingastumejoj, la kantemaj orgorĝaj homoj, kaj ĉio, tiu kredo kaj helpemo per kiuj la vilaĝa loĝantaro sorĉas la ĉiutagan vivon pli bela, kaj la futuron pli bona, ĉio, tiu donas la valoron de ĉiutagoj.

Okaze de altgrada Renkontiĝo, ni deziras multe da sukcesoj kaj al la popolkant-grupoj de Tállya, Abaujszántó kaj tio de aliaj.

Adrienne s-rino Pásztor

Stefano Pál

Historio de la miŝkolca esperanto-movado

Parto VI-a

- daŭrigo -

Unu epoko finiĝis - morto de D-ro Kolomano Kalocsay

La 27-an de Februaro 1976 mortis D-ro Kolomano Kalocsay. Ne nur la hungaraj, sed ankaŭ la eksterlandaj esperantistoj funebris lin. Ĉe lia entombigo ankaŭ la miŝkolcanoj ĉeestis en Máriabesnyő. En la Esperanto-klubo de Londono la 5-an de Marto 1976 la prezidanto de UEA inter aliaj jenajn diris: " Kalocsay estas unu el la malmultaj homoj, ĉe kiu la fabelo kaj la realaĵo estas sama. Mi sentas min honorigita, ke mi

ekkonis ne nur la homon, sed unu historian fenomenon. Mi konis ne nur unu amikon, sed la plej veran, noblan enkarniĝon de la esperantismo. La spirito restas eterne. Ni estu dankemaj, ke Kalocsay vivis....." Pri Teophile Cart forpasita en 1931 -- post 45 jaroj -- diritaj vortoj de Kalocsay estas valoraj ankaŭ ĉe li: " Ni ĝemas mallerte pro lia forperdo, sed la morto ne estas la fino por la genioj. Li forpasis, ve, mortis, sed liaj agoj restis."

Ankoraŭ en ĉi tiu jaro /1976/ *Ildikó Király* -- nepino de Ludoviko Király - raportis pri sia Esperanto-vojaĝo en Anglio. Poste oni prezentis pere de sonbendo la muzikigitajn poemojn de D-ro Kolomano Kalocsay kaj liajn parolojn, diritajn en Miskolc en 1961.

En Aprilo de 1976 D-ro Ludoviko Győry Nagy gvidis delegitaron de la miŝkolcaj esperantistoj al Tatraska-Lomnica. La slovakaj esperantistoj rekompencis la vizitadon. Somere de 1976 la geedzoj Pásztor faris pollandan rondvojaĝon, dum tiu la Pola Esperanto-Asocio certigis la tranoktejon por la du miŝkolcaj aktuvuloj. La miŝkolcanoj plurfoje renkontiĝis kun la eksterlandaj esperantistoj pere de la ĝemelurbaj kontaktoj. Ĉi tiujn kontaktojn *Štefano Temeši*, *D-ro Ludoviko Győry Nagy*, *Barnabo Batta* organizis. Krome *Maria Bušai*, miŝkolca instruistino organizis reciprokajn vizitadojn inter la bazlerneja Esperanto-grupo de Szirmabesenyő kaj la bulgaraj pioniroj. Fine de 1976 la TEK-sekretariinajn taskojn *Adrienne s-ino Pásztor* ne plu povis fari pro persona problemo kaj laboreja okupado kaj rezignis pri la sekretariina posteno. Poste ŝi partoprenis en la klubvivo, sed en la movada vivo ne. Temis pri tio, ke anstataŭ ŝi la laboron *Gustavo Lukács* faros, sed la turisman kaj movadan aferojn *Barnabo Batta* faris helpe de *Ladislao Pásztor*, kiu la taskojn de klubsekretario faris. Gustavo Lukács reprezentis la klubon dum la en- kaj eksterlandaj aranĝoj, kongresoj. Li partoprenis iun bazgradan rektan instruadon de Esperanto. (laŭ la Ĉeh-metodo) Li akiris tie bonegan rezultan bazgradan diplomon.

Memoriga landa renkontiĝo en Miskolc 1977-1981

Sep jardekoj, fero-diplomo, kaj pro Esperanto

300 rolantoj – Gasto: Anna Barla

La 23-an de Aprilo 1977 en la teatra salono de Kulturdomo „Rónai Sándor” pli ol 300 pioniroj (lernantoj el lernejoj: Silkkampa, Vörösmarty, Fadrus, Táncsics-placa kaj Szirmabesenyő) prezentis festan programon okaze de la amikeca semajno. Gvide de fakinstruistino, *Maria Bušai* kunsidis faka lanborkomunumo de instruistoj Esperanton. La 21-22-an de Majo akiris 16 personoj A-diplomon kaj 3 personoj B-diplomon. Estas bona afero, ke *Ildikó Király* instruas Esperanton al 10 universitatoj (szr). En Marto 1978 la miŝkolcaj esperantistoj aranĝas amikecvesperon, kiun partoprenas ankaŭ internacia klubo de departementa komitato de la Patriota Popolfronto.

En Aprilo D-ro Ludoviko Győry Nagy prelegis en Sárospatak dum la Esperanto-studenta renkontiĝo pri Zamenhof, kreinto de la lingvo.

En Gyula somere de 1978 estis aranĝita Landa Esperanto-Konkurso. Dum tiu konkurso bazlernejoj de Szirmabesenyő gajnis je la grupkonkurso por la sesaj klasanoj.

Esperanto-grupo de Kulturdomo „Rónai Sándor” ŝanĝigas nomon, ĝia nomo estos: „Ora Duopo Kalocsay-Baghy”

La internacia amikeca semajno ĉiam estis taŭga por festi. Ĉi tiel okazis ankaŭ en 1978, la 23-an de Februaro. Tri pedagogoj (*Maria Bušai, sr-ino Károly Olajos kaj Ildikó Zsilka*) instruis pionirojn de Szirmabesenyő, precize 60 verdkravatajn lernejanon. La reprezentantoj de Patriota Popolfronto, Anna Barla kaj Petro Biró rigardis la programon, kiuj estis anoj de la miŝkolca laborista esperanto-grupo gvidita de Adalberto Lehóczky.

Aŭtune de 1978 la miŝkolcanoj aranĝis turistprogramon, la 3-an „aŭtuna migrado”, kiun organizis *Barnabo Batta*.

La 4-a estis aranĝita fare de Pécs-anoj en 1979.

D-ro Ludoviko Győry Nagy transprenis sian ferdiplomon je la 5-an de Novembro 1979 en la Universitato Eötvös Lóránt, en Budapeŝto por sia 65-jara advokata agado.

La TEK de departemento B.A.Z. aranĝis lernokursojn komencan, progresan kaj supergradan en Miskolc en la Kulturdomo „Rónai Sándor”. La lernokursoj gviditaj ĉefe de budapeŝtaj prelegantoj havas 50 partoprenantojn kaj post 10 dimanĉaj antaŭtagmezoj ili ricevis diplomon, per kiuj ili havas rajton por instrui Esperanton.

Landa renkontiĝo - du-taga programo

La 23-an de Januaro 1978 *Suzana Barcsay*, prezidantino de Landa Esperanto-Instruada Komitato vizitis en Miskolc la laborkomunumon de pedagogoj instruantoj Esperanton kaj Sekcion pri kulturaj aferoj de la departemento.

En la lernojaroj 1978/79 lernis Esperanton en 9 lernejoj, en 19 klasoj 311 pioniroj en departemento B.A.Z. La plej multaj Esperanto-lernantoj estis en Szirmabesenyő kaj Miskolc. La Esperanto-grupo „Ora Duopo Kalocsay-Baghy” salutis *D-ron Ludoviko Győry Nagy*, prezidanton de departementa TEK en Marto 1979, okaze de lia 87. naskiĝtago. El liaj rememoroj pri jaroj 1912-13 pretiĝis sonregistraĵo. En Junio vizitas 3 membra delegitaro al Košice, kie oni aranĝis feston okaze de 55-a jardatreveno de fondiĝo de la Esperanto-klubo. Okaze de la Landa Fervojista Esperanto-Renkontiĝo oni metas novajn tabulojn en Miskolc-Tapolca en Esperanto-parko kaj en strato Julio Baghy.

Dum du tagoj de la 15-a Landa Fervojista Esperanto-Renkontiĝo (30 Junio – 1 Julio 1979) estis memoriga por la partoprenantoj. La fervojistan forumon gvidis *D-ro Stefano Bácskay kaj D-ro Jozefo Halász*. La tri partan ekspozicion malfermis Robert Szuchy, sekretario de Patriota Popolfronto. Dum la festa kunsido partoprenis Elfride Krause, sekretario de la internacia Fervojista Esperanto-Asocio. Diplomoj de „Mondpaca Esperanto-Movado”, la festa kulturprogramo (programo de pioniroj de Szirmabesenyő kaj esperantlingvaj kantoj de vira koruso de Hungara Ŝtاتفervoja Veturilripareja Uzino) estis memorigaj.

La 1-an de Julio oni aranĝis 3 ekskursojn:

1. Al Aggtelek – florkronado de Esperanto-marmortabulo.
2. Zamenhof-strata kaj Esperanto-placa florkronado. Vizitado de fortikaĵo de Diósgyőr. Ekskurso al Esperanto-fonto.
3. Vizitado al Miskolc-Tapolca al la strato Julio Baghy kaj Esperanto-parko.

Sep esperantistaj jardekoj – Postmorta „Pro Esperanto”

La Miŝkolca Sociala Hejmo (pordego Szentpéteri) havis du esperantistajn loĝantojn: *Adalberto Lehóczky kaj Suzana Gerő*. La antaŭa estis gvidanto de la Miŝkolca Laborista Esperanto-Movado, la pli lasta nun ellernas la esperantan lingvon. Ankaŭ Suzana estas membro de nova Esperanto-grupo de Miskolc, kiun oni fondis en Februaro de 1980, ties

nomo estas: Miŝkolca grupo de Sanitara Komitato de HEA. Dum la fondiĝanta kunsido ĉeestas kuracistaj esperantistoj kaj simpatiistoj de Miskolc.

La fondiĝo estis la rezulto de la organiza laboro de *d-ro Georgino Körmendy kaj d-ro Paŭlo Zaletnyik*

En la grupo Suzana Gerő faradis protokolojn esperantlingve pri la Esperanto-movadaj agadoj. El inter ties iĝis famaj fakaj prelegoj prezentitaj de anoj enlande kaj eksterlande.

La fondiĝon de la miŝkolca tria (kun fervojistaj la kvina) Esperanto-grupo D-ro Ludoviko Gyóry Nagy, prezidanto de departementa TEK jam ne povis sperti. En sia 88-jaraĝo – pro bedaŭrinda strata akcidento – li mortis. Li ricevis la 9-an de Marto 1980, la „Pro Esperanto” honorigon de HEA, kaj tiun transprenis la miŝkolcaj delegitoj dum asembleo de HEA, kaj pludonis al la familianoj. Dum lia entombigo en la Avaŝ-monta reformata tombejo la 23-an de Februaro en 1980, ĉeestis la miŝkolcaj esperantistoj, estraro de HEA kaj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. *Ada Csíszár*, zorganto de literatura heredaĵo de D-ro Kolomano Kalocsay diris funebro-parolon en la nomo de HEA.

Aŭtune plu daŭras korespondadaj kaj vesperaj lernokursoj en la Kulturdomoj „Vörösmarty” kaj „Rónai Sándor”. *D-ro Nikolao Fehér* faras Esperanto-arttradukaĵojn kaj gramatikan kompilaĵon, kiujn li prezentadas.

Inter 1978-80 en Miŝkolco faris 45 aŭskultantoj lingvoekzamenojn A kaj B.

Movado de fervojistoj - Kooperativaj tagoj

Ambaŭ miŝkolcaj fervojistaj Esperanto-fakgrupoj organizas lernokursojn kaj aranĝas prelegojn. La 17-an de Februaro 1981 partoprenas ankaŭ D-ro Stefano Bácskay, prezidanto de fervojista sekcio de HEA la membrokunvenon de Esperanto-grupo Vörösmarty. Ĉi tiu Esperanto-grupo ekde sia ekesto bone servis aferon de Esperanto. Ekde 1954 funkcias Esperanto-grupo de Hungara Ŝtatformo Veturilripariga Uzino. Ĝi alvokis socialistajn brigadojn de la uzino por lerni la lingvon. Ili petas samideaninon Márta Váry, ke ŝi estu kursgvidantino. Sindikato de la fervojistoj protektas tiun laboron. La Junularan Landan Renkontiĝon en Szombathely partoprenis 6 miŝkolcaj junaj esperantistoj.

En 1981 en Miŝkolco oni aranĝis la Landajn Kooperativajn Tagojn. En apartaj librotendoj oni vendadis esperantajn eldonaĵojn, la miŝkolcanoj volis akiri adeptojn per flugfolioj por Esperanto. Multe da homoj anonciĝis ankaŭ al lernokurso. Landa centro de la Kooperativoj esprimis sian laŭdon al Barnabo Batta, prezidanto de departementa TEK.

Fine de 1981 la bazgradan ekzamenon faritaj esperantistoj deziris, ke oni aranĝu konversacian, parolkapablecan, evoluigan lernokurson. Multe da esperantistoj anonciĝis al la kvar-monata lernokurso.

Esperantigis László Pásztor

- ni daŭrigos -

ŜERCO

Foje iun matenon, la direktoro eniras en la kontoron kaj tie li trovas submetitan ĉefon, kiu ĵus tiam interkisas la sekretariiston. Li surkrias lin indignite:

- Geza, ĉu mi pagas vin por fari tiun-ĉi?
- Ne, sinjoro, mi agas tion tute proprakoste.

(El la Tagĵurnalo Nordhungario, la ŝercon esperantigis Adri Pásztor)

DISTINGOJ

PREMIO DEGUĈI AL RENATO CORSETTI

En la fermo de la 93-a UK en Roterdamo estis anoncitaj diversaj premioj kaj distingoj. La plej prestiĝan el ili, Premion Onisaburo Deguĉi, ricevis **Renato Corsetti**.

Premio Deguĉi estis starigita en la Jubilea Jaro 1987 per donaco de Oomoto por ĉiujare premii agadon, kiu pere de Esperanto antaŭenigas la internacian amikecon kaj solidaron en la spirito de Lazaro Ludoviko Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi. Pri la ricevanto de la Premio decidis la Estraro de UEA. La Premio konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj.

Aljuĝante la Premion al Renato Corsetti, la Estraro de UEA skribis: "Renato Corsetti estas unu el la plej elstaraj agantoj de Universala Esperanto-Asocio. Por li Esperanto estis ĉiam nedisigeble ligita al agado por pli bona mondo, por internacia amikeco, solidaro kaj paco. Antaŭenigi tiujn idealojn signifas al li antaŭenigi Esperanton, kaj tute aparte, disvastigi ĝin precipe al tiuj partoj de la mondo, kie la Internacia Lingvo apenaŭ aŭ tute ne havas adeptojn. Tio instigis lin al pionira laboro por krei Esperanto-movadon en multaj landoj de la Tria Mondo, precipe en Afriko kaj arabaj landoj, ĉiam celante, ke al la novaj esperantistoj la posedo de la nova lingvo fariĝu rimedo por plivastigo de siaj spiritaj horizontoj kaj por persona kresko."

* * * * *

LERNU.NET KAJ EDUKADO.NET DIPLOMITAJ

La Estraro de UEA rajtas rekoni eksterordinare meritplenan agadon por la Internacia Lingvo per Diplomo pri Elstara Agado. La diplomo estis starigita pasintjare. En 2008 ricevis ĝin du interretaj projektoj: "lernu.net" kaj "edukado.net".

"lernu.net" estas plurlingva paĝaro, kiu estis lanĉita en 2002 kaj celas helpi al ret-uzantoj informiĝi kaj lerni Esperanton senpage kaj en facila maniero. Verŝajne ne estas troigo diri, ke nuntempe ĝi estas la plej granda lernejo de Esperanto en la mondo. Ĝi estas vizitata averaĝe 75.000 fojojn monate. ĉirkaŭ 7000 lernantoj jam kompletigis la unuan parton de ĝia baza kurso kaj 1500 lernantoj finis ĝian lastan, okan parton.

"edukado.net" estas retejo por instruistoj, prizorgata de **Kováts, Katalin**. Ĝi celas subteni kunlaboron inter instruistoj, sed ĝi estas ankaŭ helpilo por memlernantoj. Ĝi estis lanĉita en 2001 kaj renovigita en 2005. En la retejo troviĝas i.a. katalogo de lerniloj, "lerniloteko" por interŝanĝi ekzercojn kaj testojn, legejo de lernosubtenaj materialoj, koresponda servo, ktp. La teamo de edukado.net liveris nemalhaveblan helpon por realigi la Esperantan version de la Komuna Euxropa Referenckadro por lingvo-ekzamenoj kaj de kelkaj jaroj prizorgas paroligajn lecionojn en UK-oj.

* * * * *

PREMIO GRABOWSKI AL DU INTERLINGVISTOJ

Fondaĵo Antoni Grabowski de UEA subtenas elstarajn atingojn de la Esperanta kulturo, precipe, sed ne nur, en la kampo de beletro. Ĉi-jare ĝiaj premioj havis interlingvistikan fokuson. La komisionanoj de la Fondaĵo (Ulrich Lins, István Ertl István kaj Mine Yositaka) aljuĝis du egalrangajn premiojn, je la valoro de po mil usonaj dolaroj, al **Koutny, Iona** kaj Andy Künzli.

Iona Koutny, hungara lingvistino vivanta en Pollando, kreis kaj jam de dek jaroj animas la popularajn kaj rekonatajn Interlingvistikajn Studojn ĉe Universitato Adam Mickiewicz en la pola urbo Poznan. Spirita heredantino de prof. Szerdahelyi István, ŝi kvazaŭ transplantis la Esperanto-fakon de la Budapeŝta Universitato ELTE en polan grundon, kie ĝi disfloris intermacie.

Andy Künzli, svisa politologo, pli ol 15 jarojn laboris super sia monumenta enciklopedio "Universalaj lingvoj en Svislando", kiu donas panoraman bildon pri 100-jara historio de la movado ne nur Esperanta, sed ĝenerale planlingva, en Svislando. La riĉa enhavo de tiu ĉi unika verko pri la planlingva movado de unu lando estas modela pro siaj scienca kompetenteco kaj objektiveco.

(laŭ GK de UEA) - (oficejo@eventoj.hu)

OSIEK-premion en 2008 ricevis Sergej Pokrovskij

Siberia esperantisto Sergio Pokrovskij, membro de la Akademio de Esperanto, estas laŭreato de la OSIEK-premio 2008. Oni atribuis al li ĉi tiu prestiĝa premio la 18-an de julio 2008 per sekreta voĉdonado en la Internacia Esperanto-Konferenco en Ŝempeter pri Gorici (Slovenio) pro la "Komputika Leksikono" (Sezonoj, 1995).

Legu pli en la retejo <http://www.esperanto.org/Ondo/> en la rubriko "Novaĵoj", kie estas ankaŭ la listo de ĉiuj laŭreatoj, ekde la jaro 1990.

(laŭ[esperanto-rus-informoj] - (oficejo@eventoj.hu))

La membraro de la Miskolc urba EAR „Király Lajos”, kore gratulas al la distingitoj kaj deziras pluan tutsukcesan poresperantan agadon!



NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Retpošto: pasztor.laszlo4@chello.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>

MSN: pasztor.laszlo4@chello.hu